<i>Amanto - dashnor/e</i>	<i>Amato - i, e dashuruar</i>
<i>Manĝoto - diçka që do hahet</i>	<i>Manĝonto - ai që do hajë</i>

Çu vi povas kompili frazojn kun tiuj novaj gramatikaj elementoj? Provu!

Tasko: Diru la sencon de ĉi subaj vortoj!

<i>Subteni</i>	<i>Malaperigi</i>	<i>Elteni</i>	<i>Utiligi</i>	<i>Deteni sin</i>
<i>Alivorte</i>	<i>Kunordigi</i>	<i>Sinteno</i>	<i>Loĝigi</i>	<i>Memorigi</i>
<i>Plifortigi</i>	<i>Renovigo</i>	<i>Starigi</i>	<i>Utiligebla</i>	<i>Esperigi</i>
<i>Forigi</i>	<i>Devigi</i>	<i>Senmorta</i>	<i>Malplenigi</i>	<i>Senesperigi</i>
<i>Sciigi</i>	<i>Kelkfoje</i>	<i>Transdoni</i>	<i>Superrigardo</i>	<i>Altstatura</i>

Almetu la prepoziciojn:

Mi petas glason_____ kafo kaj iom_____ akvo. La knabino ŝatas esti bela, pro tio ŝi bel_____ sian vizaĝon. Tiu knab_____ agis malbone kaj plor_____is la knabinon.

La hodiaŭa **teksto** celas ripetigi kaj plifortigi jam ellernitajn elementojn.

Malbela Tago

Hodiaŭ mia patrino estis tre maltrankvila. Mi venis el la lernejo kaj raportis al ŝi, ke mi ricevis malbonan noton. Ŝi diris :

- Knabaĉo, vi devas pli multe laborigi vian kapon. Kiom da malbonaj notoj vi havas?

Mi estis malĝoja.

- Iru en vian ĉambron kaj lernu! - ŝi diris.

Mi sidis en mia ĉambro, sed mi povis nek lerni, nek legi. Miaj pensoj estis ĉe ludoj kun miaj amikoj kaj ĉe sporto. Mi diris al mi mem :

- Ĉu mi estas tiom malsaĝa, kvankam mi lernis multe?

Tiam patrino eniris en la ĉambron kaj aŭdis miajn vortojn. Ŝi tuj respondis :

- Ne, mia kara, vi ne estas malsaĝa. La problemo estas, ke vi devas lerni multe pli. Tiam vi ne havos nur malbonajn notojn.

- Ankaŭ nun mi ne havas ilin. Mi havas bonon noton al muziko. - mi diris.

La patrino subite eksidis. Tio denove plibeligis la tagon. Sed la problemo tamen restis.

Respondu al demandoj:

Kio malĝojigis la patrinon?

Kiu estis la kaŭzo, laŭ ŝi, ke ŝia filo ricevas malbonajn notojn?

Ĉu tiu knabo estas vere malsaĝa?

Kion devas fari la knabo ?

Kian lecionon ricevas ni de ĉio ĉi tio ?



Miku esperantist german Hartmut Fillmann ne kalane e Petreles Tirane

Mësimi i Nëntë (La Naŭa Leciono)

Saluton al ĉiuj ! Hodiaŭ ni konatiĝos kun lastaj afiksoj en Esperanto. Jen ili:

Sufikso “an” tregon përkatësinë në një grup. P.sh.:

klubano - antar klubi	partiano - antar partie	samklasano - bashkënxënës
sampatriano - bashkëpatriot	kristano - kristian	islamano - mysliman etj

Sufikso « uj » tregon enën ose mbajtësen e objektit. P.sh.:

panujo - sepet buke	monujo - kuletë parash	Albanujo - vendi i shqiptarëve
pomujo - mollishte	fagujo - ahishte	sukerujo - ena e sheqerit

Sufikso “il” tregon mjetin me të cilin kryhet veprimi që përshkruhet te rrënja. P.sh.:

muzikilo - instrument muzikor	Tranĉilo - thikë	Manĝilo - lugë e pirunj
traborilo - shpuese vrimash	vojmontrilo - tabelë rrugore	fajfilo - fyell

Sufikso “um” ndonëse s’ka një kuptim plotësisht të caktuar përdoret shpesh. Ja disa shëmbuj:

plena - i plotë	plenumi - përmbush, kryej	proksima - i afërt	proksimume - përafërsisht
aero - ajër	aerumi - ajros	vento - erë	ventumi - shfryej, freskoj
mastro -	Mastrumi -	suno -	sunumi -
Gusto -	gustumi -		

Sufikso “estr” tregon kryesinë. P.sh.:

ŝtatestro - kryetar shteti	lernejestro - drejtor shkolle
urbestro - kryetar bashkie	partiestro - kryetar partie

Sufikso “id” tregon pjellën e diçkaje frymore. P.sh.:

homido - foshnjë	hundido - klysh qeni
kokido - zog pule	Ĉevalido - mëz, apo visk

Sufikso “ing” tregon këllëfin e diçkaje. P.sh.:

kandelingo - mbajtëse qiriu	plumingo - mbajtëse e pendës	cigaringo - çibuk etj
-----------------------------	------------------------------	-----------------------

Sufikso “ĉj” përdoret për t’i bërë përkëdhelës emrat mashkullorë. P.sh.:

patro - baba Paĉjo - babake Petro - Peĉjo etj

Sufikso “nj” përdoret për t’i bërë përkëdhelës emrat femërorë. P.sh.:

patrino - nënë panjo - mamake, nënoke, etj

Sufikso “iv” është i afërt me “ebl”. P.sh.: kreiva - krijues

Sufikso “ism” tregon një ideologji

Kristanismo	Anglismo	Alkoholismo	Socialismo
Rasismo	Totalismo	marksismo	Naciismo

Prefikso “bo” përdoret për të treguar lidhjet familiare pas martesës. P.sh.:

frato - vëlla	bofrato - kunat	patro - baba	bopatro - vjehërr
bofilo - dhëndër	bofilino - nuse		

Prefikso “dis” tregon ndarje. P.sh.:

doni - jap	disdoni – shpërndaj
Ŝiri - këpus	Disŝiri - bëj copë e çikë
Iri - shkoj	disiri - shkoj gjithandej
disigi - ndaj	Disiĝi - ndahem

Tasko: Diru la sencon de jenaj vortoj :

nekredebla	organizado	Informado	parolrajto	tiukaze
libervole	Parolado	Survoje	restado	Ĉirkaŭaĵo
homaro	Kredeble	Kunvojaĝi	Domaĉo	vagonaro
Manĝaĵo	Novaĵo	Mirinda		

Kiel oni uzas la kondicionalon? (si përdoret kushtorja?). Ja një fjali:

Se la vetero estus bona, mi certe venus.
Ĉu vi povas diri kelkaj aliajn propoziciojn?

Adverboj “kvazaŭ” kaj “apenaŭ”

La patro frapis al la pordo, kvazaŭ li estas fremdulo (la patro frapis al la pordo kvazaŭ fremdulo). - Babai trokiti në derë, sikur të jetë i huaj.

Mi apenaŭ finis mian laboron, kiam ŝi alvenis. - Unë sapo e mbarova punën kur ajo erdhi.

Li apenaŭ scias legi. - Ai pothuaj s’di të lexojë.
Li estis apenaŭ foririnta, kiam vi venis. - Ai sapo ishte larguar kur erdhët ju.
Uzo de « ne »

Depende de la loko kie estas, la vorteto « ne » donas al la propozicio diversajn sencojn. Ekz.

Mi ne kantas ĉiutage - Unĉe s'kendoj ĉdo ditĉe.
Ne mi kantas ĉiutage. - Nuk jam unĉe qĉe kendoj ĉdo ditĉe

Adjektivo de loka rilatiĝo.

enlande - brĉnda vendit	survoje - rrugĉs surtere - tokĉsore	subakve - nĉnujĉe
propramane - me duart e veta	enaere - nĉ ajĉr	eksterlande - jashtĉ vendit

Nova teksto

Planoj pri veturado

Petro kaj Marija volis vojaĝi al alia lando en libertempo. Li decidis iri al Italio, bela lando kun malnovaj urboj kaj aliaj belaĵoj. Ili estis feliĉaj.

- Kie estas mia vestaĵo? - ŝi demandis.

- Ne forgesu kunporti la libron por lerni Esperanton. Ni povus komenci jam en la vagonaro.

- En la vagonaro ni nenion faros, kara Petro. Ni veturos per aŭto. Mi havas sekreton: mia onklo Bonifacio plenumis mian deziron kaj donis al mi sian aŭton por uzo. Ĝi jam staras antaŭ la domo.

- Sed mi devas diri....

- Nenion diru, karulo, ni eksidu en la aŭto.

Ankaŭ la vestaĵoj estis en la aŭto. Sed ili ankoraŭ sidadis kaj atendis.

- Do, karulo, - ŝi diris - kial ni ne ekveturas?

- Karulino, ankaŭ mi havas sekreton. Mi veturigis la aŭton, sed mi ne scias kiel. Mi neniam lernis tion.

Ĉu plaĉis al vi tiu rakonto?

Ĉu vi povas rediri ĝian enhavon helpe de jenaj **demandoj**?

Kian sekreton havis Marija? Kaj Petro?

Kian planon havis ambaŭ ili?

Ĉu ili realigis ĝin?

Ĉu tiu plano estiĝus alimaniere?

Bonan tagon ! Ĝis revido!



Takim esperantistësh në kalanë e Shkodrës

Mĉsimi i dhjetĉ (La Deka leciono)

Bonan matenon!

Jen alvenis la deka leciono. Hodiaŭ ni klopodos ripeti ĉiujn jam lernitajn gramatikajn elementojn, kiel afiksojn, finaĵojn, prepoziciojn, ks., kiuj, kiel vi jam vidis, estas tre utilaj kaj gravaj. Jen ili:

Prefiksoj:

bo dis ek eks fi ge mal re

Sufiksoj :

aĉ ad aĵ an ar ĉj ebl ec eg ej em

er estr et id ig il in ind ing ist nj

obl on op uj ul um

Tasko : Formu po unu propozicio per ĉi - supraj afiksoj.

Finaĵoj :

o a e on an en i u us

as is os it at ot int ant ont

iu io ia ie ies ien ial iel iom iam

Tasko: Diru po unu vorto kun ĉi supraj finaĵoj.

Prepozicioj:

al anstataŭ antaŭ apud cis ĉe ĉirkaŭ

da de dum ekster el en ĝis

inter je kontraŭ krom kun laŭ malgraŭ

per po por post preter pri pro

sen sub super sur tra trans maltrans

Tasko: formu propoziciojn kun ĉi supre menciitaj prepozicioj.

Nova teksto

Familianoj kunvenas

Kiom rapide pasas tagoj! Morgaŭ estas la naskiĝtago de via patro, Marko. Alvenos kelkaj familianoj kaj geamikoj. Ĉu vi bonvolus iom helpi? Trovu iomete da tempo por ordigi vian ĉambron. Mi ŝatus kuiri ion bonan. Por la naskiĝtaga kuko mankas lakto en la hejmo. Necesas havigi iom da manĝaĵo en vendejo. - Bone mi aĉetumos por la naskiĝtago. Sed anstataŭ sidi kaj manĝegi kun neinteresaj familianoj, mi ŝatus ekskursi kun klubanoj. - Kun kiuj klubanoj? - diris la patrino kaj ĵetis iajn paperojn en la paperujon. - Morgaŭ frue kunvenas anoj de mia sporta klubo. - Sed, kara mia, ĉu ĝuste morgaŭ vi devas foresti? Ĉu vi ne intervidiĝas kun viaj samklubanoj tri foje semajne? - Ĉu mi rajtas proponi, ke mi kunmanĝos kun la familianoj, sed en la dua parto de la tago, mi foriros kun miaj geamikoj. Post la kuko Maria kaj Petro certe parolos pri la malsukcesa veturado per aŭto. Malinterese. Mi ne plu volas tion aŭdi. Kial ni ne havas iun ideoriĉan onklon Bonifacio en nia familio? !

La patrino ridetis je liaj vortoj. Ŝi scias ke Marko iom tro parolas hodiaŭ - Kara Marko, ne sufiĉas nur riĉeco de la ideoj. Necesas ankaŭ monujo plena por realigi ilin.

La patrino post iom da silento daŭrigis:

Nu, antaŭ kelkaj minutoj telefonis Ana, kaj ankaŭ ŝi vizitos nin morgaŭ. Ŝi tre ŝatas dolĉajn kukojn, kvankam ŝi atentis por ne dikiĝi.

Tuj Marko ŝanĝis la opinion. Sen Ana dum la ekskurso li estus tre soleca. - Patrino, tiuokaze mi tamen pasigos la morgaŭan tagon hejme.

Respondu al la demandoj:

Kial Marko ne ŝatas longe sidi kun samfamilianoj? Kion intencas fari li? Kiu jam telefonis al lia patrino? Ĉu Marko realigis sian planon por ekskursi? Kial?



Me studentë shqiptarë e të huaj në Dhërmi

Mësimi i njëmbëdhjetë- La Dekunua Leciono

La kompleksaj formoj de tempoj de la verbo

a) per helpverbo

Mi estis skribinta	La letero estis skribita
Mi estas skribinta	La letero estas skribita
Mi estos skribinta	La letero estos skribita

Mi estis skribanta	La letero estis skribata
Mi estas skribanta	La letero estas skribata
Mi estos skribanta	La letero estos skribata

Mi estis skribonta	La letero estis skribota
Mi estas skribonta	La letero estas skribota
Mi estos skribonta	La letero estos skribota

b) per participoj

Mi skribintis	Ĝi skribitis
Mi skribantis	Ĝi skribatis
Mi skribontis	Ĝi skribotis

Mi skribintas	Ĝi skribitas
Mi skribantas	Ĝi skribatas
Mi skribontis	Ĝi skribotis

Mi skribintos	Ĝi skribitos
Mi skribantos	Ĝi skribatos
Mi skribontos	Ĝi skribotos

Ekzemploj :

Kiam via domo estis konstruata, mia domo estis konstruita
Kiam oni estis konstruanta vian domon, oni estis konstruinta la mian.
Oni transportis lin en hospitalon, en kiu li estis operaciita.

Nova Teksto

La Vojaĝonto

Ĉu vi memoras pri nia amiko Marko? De unu monato kaj duono li laboras kiel helplaboristo en la fabriko. Lia laboro ne estas tre laciga; ofte li havas tempon por pensi pri la bela vojaĝo, kiun li faros dank' al la mono, kiun li nun gajnas. Ĉiam li revas pri vojaĝoj. Kiam li estis knabeto, li kutimis iri al la stacidomo por rigardi la trajnojn, kiuj haltis tie. Li enviis la staciestron, kiuj rajtis haltigi ilin. Vojaĝintoj elsaltis, dum la trajno ankoraŭ ruliĝis; sur la kajo vojaĝontoj jam serĉis liberajn sidlokojn per la okuloj. Kien ili ekveturos? Ĉu al Germanio, ĉu al Svislando, ĉu al Pollando? Marko baldaŭ mem forvojaĝos. Li povas fari tion ekde nun, sed ĉikaze la fabrikestro pagus al li nur tri kvaronojn de la salajro. Pli bone resti ankoraŭ kelkajn tagojn.

Tasko : Respondu al la demandoj:

Kial Marko nun laboras? Kion revas li? Ĉu tio eblas? Kial li ne forvojaĝas ekde nun?

Traduku en la Albanan:

Juĝito estas homo, kiun oni juĝis

Juĝato estas homo, kiun oni juĝas

Juĝoto estas homo, kiun oni juĝos

La tempokomplemento

Matene mi bone laboras = la matenon mi bone laboras

Hodiaŭ mi laboris la tutan tagon. = La postan tagon li revenis.

Skizoj pri Historio de Internacia helpa Lingvo en Albanio

Doc. Vasil Pistoli

La internacia helpa lingvo Esperanto estas kreita en 1887 de pola okulisto Ludoviko Lazaro Zamenhof (1859 - 1917). Ŝajnas ke la unua albana esperantisto estis Mark Kakarriqi, kiu lernis Esperanton en Parizo en 1907. Laŭ "Enciklopedio de Esperanto" p:22 - 23, la unua albana Esperantisto estis Lazër Shantoja en Shkodra en 1913. La malnova Esperantisto Janko Pali kiu renkontis Lazër Shantoja - n en 1912, memoras ke li sin ekokupis pri Esperanto pli frue. En 1928 estis eldonita en Albanio Esperant - lingva verko pri Skanderbeg, 144 p. kompilita de Cuk Simoni kun antaŭparolo de ĉeĥa profesoro Miloš Subaš. Mem Janko Pali lernis Esperanton en 1926, kaj en 1931

fariĝis membro de UEA. Post du jaroj li skribis artikolon pri albana historio kaj lernejo eldonita en la “Internacia Pedagogia Revuo” de Dresdeno (Germanujo). Same laŭ “Enciklopedio de Esperanto” la unua lernolibro pri Esperanto en Albanio aperis en 1928.

Ĉu vi komprenis la enhavon? Ne forgesu tiajn faktojn el nia movada historio! Ĝis revido!



Miq esperantiste nga Izraeli, ShBA etj. ne kalane e Gjirokastres

Mĉsimi i dymbĉdhjetĉ - La Dekdua Leciono

Saluton! La kompleksaj tempoj de la verbo estas iom malfacilaj, ĉu ne ? Ni devas ripeti ilin de fojo al fojo. Hodiaŭ klopodu formi propoziciojn per la subaj vortogrupoj:

estis

estas vizitintaj
la gejunuloj estos vizitantaj
estus vizitontaj

estu

Ĉu vi povas traduki ilin albanlingven?
Bonvolu noti:

Tuja futuro formiĝas per tuj +futuro. Ekz. *Ili tuj foiros.*

La uzo de “Tute ne”. Ekz. *Li tute ne parolas japane.*

La uzo de “Ne tute”. Ekz. *Tio ne tute estas vera.*

Ekzistas ankaŭ en Esperanto tiel nomataj “senpersonaj verboj”. Jen ili: Pluvas, ŝajnas, neĝas, eblas.

Ekz. Tutan hieraŭon pluvis kaj neĝis. Ŝajnas al mi ke vi estas iom ebria. Ĉu eblas telefoni vin je la sesa?

Traduku:

*skii parkejo gvidisto Beligi benzinujo motorcirklo skianto Remilo
Ŝipestro rajdanto Poŝtkarto Dizelmotoro gastejo kampadejo kampadisto Stampilo
hotelestro policisto leterportisto Trafiksildo Oceanŝipo flughaveno postveturilo*

Posedaj Pronomoj

Ekzemploj :

Mia libro estas interesa; la via ne. Viaj libroj estas interesaj; la ŝiaj ne.
Via pano estas pli freŝa ol mia. Kies ludilo estas tiu?
Esperanto estas ĉies lingvo. La situo de la urbo estas favora.

Nova teksto

Kien vi estas vojaĝonta

Verŝajne vi demandas vin, kien Marko estas vojaĝanta? Eble al Japanio ? Fakte la japana samideano ja estis invitinta lin, sed la flugo estus tro multekosta. Eble li iam vizitos Japanion, ekzemple post kiam li estos finstudinta en la universitato. Nun li estas malkovronta Eŭropon! Kiel ano de Esperanto - Asocio, li scias en kiuj urboj estas grupoj. Fine alvenas la granda tago! Estas la sepa kaj duono, kaj Marko matenmanĝas. Kutime li estas manĝemulo, sed hodiaŭ, pro nervozeco, li tute ne havas apetiton. La gepatroj jam estas finmanĝintaj de longe; la patro donas al sia filo lastajn konsilojn dum la patrino malfacile kaŝas sian malĝojon, pro tio ke sia filo vojaĝos tute sola.

Demandoj:

Kial Marko ne flugas al Japanio? Ĉu li estas invitita al Japanio? Kiam li povus viziti tiun foran landon? Kien li vojaĝos nun ?

Legajo

La vivo de Zamenhof

Lazaro Ludoviko Zamenhof naskiĝis la 15 - an de decembro 1859 en Bialystok, en tiama rusa Polujo, kie lia patro, Marko Zamenhof, havis lernejon kaj instruis francan kaj germanan lingvojn. Lia patrino instruis al li, ke ĉiuj homoj estas fratoj, sed en la stratoj de sia naskiĝurbo la juna Zamenhof estis atestanto de konstantaj malpacoj inter la kvar gentoj, kiuj loĝis tie: poloj, rusoj, hebreoj kaj germanoj. Evidente la fakto, ke tiuj homoj ne komprenis la lingvojn de la aliaj, estis unu el la ĉefaj kaŭzoj de la miskomprenoj. Tio jam frue vekis en la sentema knabo Zamenhof la deziron interfratigi la homojn per komuna lingvo, kaj tiu ideo okupis lin dum lia tuta vivo.

Ĉu vi jam scias iom pri la vivo de Zamenhof? **Ne forgesu tion!** Ĝis la revido!



Nje çift esperantistësh koreano - jugorë në kalanë e Beratit

Mësimi i trembëdhjetë - La Dektria Leciono

Bonan matenon al çiu! Hodiaŭ ni prikonsideros la **transitivajn kaj netransitivajn verbojn**.

Jen modelo: La trajno haltas. Li haltigas la trajnon.
La trajno veturas tra la urbo. Li veturigas la trajnon.
Ŝi komencas la lecionon. La leciono komenciĝas.

Tasko: Kompletigu

La kato kur_____. La birdo flug_____. La knabo ir_____.
La ŝoforo vetur_____. La laboro fin_____. La instruisto lern_____.

Traduku:

Ĉu la kato kuras tra la ĉambro? Ĉu la birdo flugas tra la fenestro? Ĉu li estas ĉe la spektaklo? Ĉu la aviadilo flugas trans la maron? Ĉu la hundo saltas trans la tablon? Ĉu la birdoj flugas al la suna Albanio? Petrit rigardas la trajnon. Li vizitas Tirana - n, nian ĉefurbon. Li vizitas nian ĉefurbon, Tirana - n.

Jen nomlisto de transitivaj kaj netransitivaj verboj. Memoru ĝin!

Transitivaj verboj Netransitivaj verboj

Aboni	Batali	Bani	Boli
Fendi	Bruli	Fermi	Ĉesi
Fini	Daŭri	Flari	Droni
Fleksi	Enui	Friti	Indigni
Klini	Inklini	Komenci	Krevi
Kuiri	Kuŝi	Movi	Lumi
Paŝti	Odori	Rosti	Pasi
Ruli	Pendi	Streĉi	Sidi
Sufoki	Stari	Ŝanĝi	Soni
Trompi	Ŝpruci	Ŝveli	Varii

Tasko: Formu propoziciojn kun ĉi supraj verboj.

Traduku:

onklino cindrujo glaciaĵo malplena vizitado sennuba nervozigi porkaĵo ekkrii bruego
rekomenci katido dikulo lacega mallaŭta flugeti dancejo ofta

Tasko: Kompletigu la mankantajn vortojn:

La internacia lingvo Esperanto estas kre_____ doktoro Zamenhof, pola kuracisto. Esperanto apartenas al ĉ _____ kaj nen_____. Esperanto havas ankaŭ literatur____. Ĝi konsistas el pluraj miloj _____ originalaj verkoj kaj traduk_____ ĉefverkoj de la naciaj kaj lokaj literaturoj. Vidint_____ teatraĵon kaj legint_____ poemon en Esperanto, oni ne plu dubas pri la kultura valoro de la internacia lingvo. Mi estas lern_____ la internaci_____ lingv_____ Esperant_____ antaŭ dek jaroj! Ekde tiam mi vizitis mult_____ fremd_____ land_____ kaj lernis tre facile plur_____ ali_____ lingvo_____.

Nova teksto

Se li estus sciinta...!

Marko estas sidante en la luksa veturilo, kiu ekveturas silente; nur la bruo de la glacoviŝiloj estas aŭdebla. La ŝoforo kaj sia edzino ŝajnas ignori sian gaston, kiu sin demandas ĉu li ekparolu, ĉar li komencas enui. “Kia veturaĉo”, ekdiras Marko. Nenia respondo. “Feliĉe vi alvenis”, li daŭrigas, “alie mi estus malsekiĝinta ĝis mia haŭto. Se mi estus sciinta, ke tiom pluvos, mi estus atendinta plian tagon, antaŭ ol ekvojaĝi”. Ambaŭ daŭ re silentas kaj Marko ne plu kuraĝas paroli. “Strangaj birdoj!” li pensas, kaj rigardas la pejzaĝon. Du horoj tiel pasas sen ununura vorto. Fine la ŝoforo haltigas la aŭton kaj diras: “Ni ne pluveturas.” Marko elaŭtiĝas kaj atendas alian veturilon ĉe la rando de la strato.

Demandoj:

Kial Marko troviĝas en la aŭto? Ĉu ĝi veturigis lin ĝis la loko destinita? Kion faris Marko poste? Per kia veturilo vi kutime vojaĝas?

Kaj nun ni konatiĝu kun du versaĵoj de nia fama albana poeto Asdreni. Tradukis Esperantlingven s - ro Vasil Pistoli.

Naturo	Mi amas
Al mi plaĉas herbo	Sur herbaro mi deziras
kaj la ora fonto	kanti, gajiĝi, ripozi
Ĝi malalten fluas	Gardi ĉirkaŭ mi brutaron,
lenta kaj trankvila	kiam paŝtas kiam trinkas.
birdoj kiam kantas	Gardi verdan ĉirkaŭaĵon
sur la branĉoj staras	plantojn kiam blovas vento.
Ĉe arbaj folioj	Gardi homojn laborante
vin sendorma lasas.	kaj virinojn kiam kantas!
Ili bele ŝajnas,	
apud mi estantante!	Ha! Mi amas ankaŭ florojn
	malfermante florflietojn!
La bordoj garnitaj	Papiliojn kiuj flugas
Je floroj broditaj	kaj sur floroj kaj lokiĝas
arbaro je ombro	mi volas ke najtingalo
altiras kuŝiĝi	kantu, kaj sun' estu varma

ekvibras folioj	kaj verdiĝu la arbaro
mi ilin rigardas	kaj ne ĉesu la kukulo!
Belega kaj plaĉa	
mirinda tre ege	Albanion ankaŭ amas
naturu juniĝas	mi ĉar tie domon havas
nepriskribeblece!	kie staris ĉe dornejo
	kaj mi ludis kun ŝafidoj;
	jen ĉi tiujn ege amas
	mi pli bone ne deziras
	nur mi tien iri volas
	Dum mi vivos, dum mi ekzistos!



Miq esperantiste ne kalane e Butrintit

Mĉsimi i katĉrmbĉdhjetĉ - La Dekkvara Leciono

Saluton! Hodiaŭ ni ekzercos la

Akuzativon.

Vidu ekzemplojn:

Marko manĝas frukton. Frukton manĝas Marko. Marko konas tiun, kiun vi serĉas. Marko estas tiu, kiun vi serĉas. Bonan tagon! Saluton! Mi iras mian propran vojon. Mi iros Parizon. Mi revenas domon. Mi revenas hejmen. Mi vojaĝos Hispanujon. Li mortis la morton de la herooj. Mi sciigas vin la novaĵon. Li petas min grandan sumon. Mi sendos la libron lundon. Li restis plurajn horojn. Ni venos la dek - trian de Junio. Mi aŭdas lin kanti. Li igis la kuraciston veni. Traduku tiun tekston en Esperanton. Traduku en la anglan. La urbo estas dividita en du politikajn opiniojn. Kion mi faru koncerne mian filon?

Vidu la diferencon:

<i>Mi promenas en la parko</i>	<i>Mi promenas en la parkon</i>
<i>Li kuras post Marko</i>	<i>Li kuras post Markon</i>

Noto: Ambaŭ formoj estas akcepteblaj: Li aperis sur la scenejo. Li aperis sur la scenejon. Vi frapis sur la pordo. Vi frapis sur la pordon

Vidu la diferencon:

<i>Marko batis Petron anstataŭ Paŭlo</i>	<i>Marko batis Petron anstataŭ Paŭlon</i>
<i>Mi konis lin kiel studento</i>	<i>Mi konis lin kiel studenton</i>
<i>Mi amas lin pli ol mia frato</i>	<i>Mi amas lin pli ol mian fraton</i>

Modeloj de propozicioj kie oni uzas la aktivajn kaj pasivajn formojn de la verbo.:

- A. La patrino volas purigi la ĉambron. Ĝi jam estas purigita de Ana.
- B. Multaj turistoj vizitas la katedralon. La katedralo estas vizitata de multaj turistoj.
- C. Venu! Mi petas! Ne petu, postulu ke li venu!

Tasko: Diru mem kelkajn propoziciojn tiajn.

Nova teksto

Ne antaŭvidita renkonto

Marko nun troviĝas en la stacidomo. Li plu vojaĝos al Bavario, kie okazos renkontiĝo de junaj esperantistoj. Por ke li alvenu akurate, li decidis veturi per la trajno. Atendante sur la kajo, li subite ekaŭdas malantaŭ si "Saluton, samideano! Mi

nomiĝas John! Verŝajne vi veturas al Bavario. Ĉu ni vojaĝu kune?” Diris tion juna anglo, kiu estis vidinta la verdan stelon gluitan sur la dorsosako de Marko. Ambaŭ nun sidas en la kupeo kaj vigle babiladas. Esperantistoj estas tre parolemaj. Multnombraj kaj diversaj estas la diskutataj temoj. La aliaj vojaĝantoj sin demandas cerbumante, kiun lingvon tiuj junuloj parolas tiel flue. Ili miras ke tiuj junuloj sin komprenas tre facile kaj ankaŭ ili ekvolus tiel bone kompreniĝi en internaciaj rilatoj.

Demandoj:

Kion aŭdas Marko dum li atendas la trajnon? Kiel John scias, ke Marko estas esperantisto? Kiel aliaj vojaĝantoj opinias pri la lingvo parolata de ambaŭ junuloj?

Aliaj gramatikaĵoj:

Uzo de “de”

Marko estas salutata de John. La paroloj diritaj de Marko eniris ties orelojn.

Uzo de “per”

La porko estis mortigita per kuglo. Ni vidas per okuloj, ni iras per piedoj, ni laboras per manoj.

Traduku:

Detyra e shtëpisë u zgjidh nga të gjithë nxënësit. E gjithë puna u krye me krahë. Gjuha e folur nga ilirët është nëna e shqipes. Letrën po e dërgoj me postën elektronike.

Uzo de “ke”

Mi demandas, ĉu li havis agrablan vojaĝon. Li petis, ke mi helpu lin. La vendisto postulis, ke mi pagu tuj. La amiko skribis, ke mi respondu lin baldaŭ. La patro promesis, ke li donacos min pli belan skribilon.

El Historio de Esperanto

Projektoj de Internaciaj Lingvoj

Oni dividas la projektojn de internacia lingvo en du kategorioj kaj distingas lingvojn “a priori” kaj lingvojn “a posteriori”. La lingvoj “a priori” estas kunmetitaj el arbitraj elementoj nur grupigitaj laŭ logikaj principoj. Al ili apartenas ekzemple la projekto “Solresol” de Sudre, bazita sur la muzikaj notoj.

La lingvoj “a posteriori” kontraŭe prenis siajn elementojn el la ekzistantaj naturaj lingvoj. Nur sur tiu bazo praktika solvo de la mondlingva problemo estas ebla, kiel pruvas Esperanto, kiu apartenas al tiu c’i kategorio.

El la Monda Beletro

Aleksander Puŝkin: Letero de Tatjana al Anjegin

Mi skribas al vi - kio plia?
Ĉu vortoj diri povas pli?
Mi scias : nun per ironia
Malŝat' min punu rajtas vi.
Sed vi, se havas vi pri mia
mizer' eĉ guton da kompat',
min ne forlasos en ĉi stat'.
Komence volis mi silenti,
kreditu, neniam el ĉi font',
eksciis vi pri mia hont',
se povus mi esperon senti,
ke mi vin vidos - iam ajn,
eĉ se nur tagon dum
semajn'
por aŭdi vin, kaj je
respondo
okazon havi, kaj - dum tag',
kaj nokto - revu en imaĝ'
pri vi ĝis nova
ekrenkonto.

Ĉerpita de Juna Amiko, dec.99

Tasko: Traduku ĝin en la albanan! Lerne ĝin parkere!



Esperanto i bashkon kombesit e ndryshem ne restorantin “La Perla” ne Tirane

Mĉsimi i pesĉmbĉdhjetĉ- La Dekkvina Leciono

Bonan matenon! Ni daŭrigu kun **gramatikaĵoj!**
La prepozicioj kiuj postulas la infinitivon estas :

Antaŭ ol, anstataŭ, krom, por, sen

Jen ekzemploj:

Oni devas lavi la manojn antaŭ ol manĝi. La patrino ŝatis ripozi anstataŭ veturi trajne. Marko povas nenion fari krom atendi ĉe la vojrando. Por ŝpari monon oni faras multon mem. Li foriris sen saluti nin. Adiaŭi sen plori.

Uzo de “Ĉu”

Ĉu mi lavu min tuj? Ĉu mi kisu vin? Ĉu mi skribu leteron?

Uzo de “Pli” kaj “Plu”

Mi ricevis nur ducent lekojn, ne unu lekon pli. Baldaŭ li ne plu havos monon en siaj poŝoj. Ni ne plu veturos.

Tasko

Traduku:

Unue oni laboru, poste oni ludu! Unue oni lernu la lecionon, poste oni amuziĝu!

Unue oni legu libron, poste parolu pri ĝi. Unue oni kaptu fiŝon, poste metu paton sur fornon!

Unue oni varmigu la supon, poste oni manĝu ĝin! Unue oni diskutu, poste oni decidu!

Ni rememoru la numeralojn!

Mi havas dek librojn. Mi posedas dudekmilojn da lekoj. Dek lernantoj ĉeestis. Kiom da libroj vi alportas? Kvar kaj du faras ses. Forigu la ses! La prelego daŭris ĉirkaŭ du horojn. La prelego daŭris horojn ĉirkaŭ du. Ĉirkaŭ du horoj pasis. Venis ĝis tridek lernantoj. Li povis kuŝi ok ĝis naŭ horojn. Mi havas centon da pomoj. Li arigis kelkdek voĉoj. Post dekkelke da sekundoj ĝi eksplodiĝis. En la deknaŭa jarcento vigliĝis nia renesanca movado. La dekkvinan de decembro naskiĝis li. Je la tria posttagmeze ni renkontiĝos kune. Frederiko la dua estis granda reĝo. Li ricevis duoblan sumon da mono. Ili kolektis duoble da pano. Duobligu vian profiton! El multaj milonoj fariĝis milionoj. Akiro kaj perdo rajdas duope. La lernantoj venis po kvar. Ili ricevis pomojn po kvin. Ĉiu infano ricevis kvin pomojn? Ili ricevis po kvin pomojn. Ili vendas podetale, pogrande, pobotele, poskatole. Multope ni pli frue finos la laboron ol unuope.

Vidu la diferencon:

Ili ricevis po kvin pomojn. Ili trinkis vinon po du glasoj.

Vizito ĉe konato

Marko veturis al universitato, kie sia konato havas ĉambron. Li ankoraŭ ne rekomencis la lecionojn sed laboris. Marko staras antaŭ la pordo de ĉambro kaj aŭdas ridojn, eĉ ridegojn. Sia amiko Henrik kartludas brue kun siaj kamaradoj. Kiam li ekvidis Markon ekkriis: Saluton, Marko! Vi estas sendito de Dio! Sidiĝu, ni nepre bezonas kvaran ludanton! Estas multe por rakonti. La venontan tagon Henrik vizitigas al Marko la urbon. Ili admiras la belegan katedralon kaj promenas laŭ la bordoj de la rivero. Ankaŭ la Palacon de Eŭropo ili vizitas. Ili estas en Strasburgo. “Ĉu la reprezentantoj de Eŭropo tie parolas Esperanton?” demandas Marko.

“Bedaŭrinde, ankoraŭ ne”, respondas Henrik, “sed Esperanto estos la pontlingvo de la futura Eŭropo...”

Tasko: rediru la tekston per viaj propraj vortoj!

El la albana literaturo

Unuaj venkoj de albanoj (1444 - 1450)

Neniu dubis ke turkoj, post favora momento, ĵetiĝus kontraŭ ribelinta Albanio. Pro tio, post la fino de laborado de la kunveno, Skanderbeg decidis sian ĉefan atenton al frua organizo de la albana armeo kaj al aliaj defendaj mezuroj. Estis klara ke Skanderbeg celis krei armeon kiu diferencus de dungataj bandoj aŭ neorganizataj kamparanaj rotoj, kiel tio estis ĉe feŭdoj. Ili ne estis kapablaj batali kontraŭ turkaj jeniĉeroj kaj spahioj. Skanderbeg, mirinda konanto de bonaj kvalitoj de la turka armeo kaj de ĝiaj mankoj, celis krei novan albanan armeon, disciplinatan, bone preparatan kaj pretan batali ĝis la fino kontraŭ malamiko.

Por kreado de tia armeo oni bezonis komenci jam de fundamento. Pro tio Skanderbeg, kiel notas liaj biografiistoj, en la aŭtuno de 1444 persone trairis tutan landon, iris de vilaĝo al vilaĝo, klarigis al kamparanoj signifon de milita mobilizo, aplikita unuafoje en Albanio kaj partoprenis al enskribado de rekrutoj. Samtempe, li inspektis fortikaĵojn, kontrolis ilian militpretecon, ordonis ripari kaj plifortigi ilin, studis vojojn je kiuj povus pasi malamikaj armeoj, kreis reton de informado, kiu povus sciigi al li pri movadoj de la ĉefa formacio de turkaj armeoj kiam aperus en albanaj landlimoj.

Tradukis Vasil Pistoli (jaro 1967)

Tasko: Traduku la tekston en Esperanton, notu en ĝi la uzon de akuzativo.



Nje bisede esperantistesh ne nje kafene ne Kruje

Mĉsimi i gjashtĉmbĉdhjetĉ - La deksesa leciono

Saluton gekursanoj! Kiel vi fartas! Bone? Mi ĝojas. Jen ni alvenis al la deksesa leciono. Ekde la dekunua leciono ni parolas kune nur en Esperanto. Ĉu tio malhelpas vin? Ĉu vi komprenas min? Klopodu ankaŭ vi paroli nur en Esperanto! Tiel vi ekposedos la lingvon pli bone kaj pli rapide? Ĉu ne?

Ni ripetu kelkajn afiksojn.

Sufikso “Op”

Ĉu vi ŝatas vojaĝi duope?

Sufikso “end”

Tiu letero estas skribenda.

Prefikso “Mis”

Mi mistrafis la vojon. Mi misaŭdis la mesaĝon. Ŝi misfaris la taskon.

Ankoraŭfoje pri la participoj de la verboj

Modelo A:

<i>Antaŭ vojaĝo oni estas nervoza</i>	<i>Vojaĝonte, oni estas nervoza</i>
<i>Dum vojaĝo oni estas ĝoja</i>	<i>Vojaĝante, oni estas ĝoja</i>
<i>Post vojaĝo oni estas laca</i>	<i>Vojaĝinte, oni estas laca</i>

Modelo B:

<i>Kiam ĝi estas purigita, la ĉambro estas pli bela</i>	<i>Purigite, la ĉambro estas pli bela</i>
---	---

Tasko: Agu mem laŭ supre menciitaj modeloj kun la propozicioj:

Post aĉeto oni estas kontenta _____
Dum dormo oni ripozas _____
Ĉar li estas punita la knabo ekploras _____
Post kiam ĝi estas studita, la leciono ŝajnas _____
facila _____

Tasko: Kompletigu:

Bala _____ la ĉambron, la dommastrino estas laca. Marko iras en la kuir _____ por scii, _ ili baldaŭ manĝos. Ĉiumatene la manĝaĵoj estas kuir _____ de la patro, ĉiuvespere _____ ili estas prepar _____ de la patrino. Tagmez _____ ambaŭ man ĝas en la fabrik - manĝejo. Ili hejtas la tut _____ dom _____ elektra hejtilo. Purig _____ la ĉambro aspektas multe pli bela _____ antaŭ _____. La filo amas la manĝ _____ kuir _____ de la patrino. Portu la ŝrank _____ en la salon _____ kaj metu la tapiŝ _____ sur la plank _____. La domo, ki _____ ni luas nun, estas pli bela _____ la antaŭ _____. Tut _____ semajn _____ ni bezonis por translokiĝi. Se mi est _____ vid _____ tiun domon antaŭe, mi est _____ aĉet _____ ĝin. Estus interes _____ scii, kiom

pagas nia najbaro pro triĉambr____ loĝejo. La infanoj ornamas si ____ ĉambr____ mem. Iliaj ____ patroj tute ne helpas ili ____.

Nova teksto

Pasigante la tempon babilante...

Vojaĝi duope ne estas enuige; la tempo forflugis kaj jam videblis la neĝkovritaj pintoj de la bavaraj Alpoj. Forlasinte la stacidomon de la urbeto, ili demandis pri la vojo; sed pro miskompreno de la donitaj klarigoj, ili ankoraŭ bezonas pli ol unu horon por atingi piede la celatan gastejon en la montaro. “Se mi estus lerninta pli serioze la germanan lingvon, ni ne estus erarintaj!” diris Marko. “Jen, ni alvenas!” ekkrias John, kaj forgesante sian lacecon, li marŝas pli rapide kaj atingas la domon. Alkurante de ĉie, ridantaj kaj ŝercantaj gejunuloj salutas ilin brue. John jam estas konata de pluraj, kiuj tuj montras al ili la domegon. Ili loĝos en agrable ornamitaj ĉambroj sur la unua etaĝo. Iliaj kunloĝantoj estas japano Susumu kaj la hungaro Janoŝ.

Demandoj: Kien veturas Marko? Ĉu junuloj trovis la domegon en monto rapide? Kial?

Simplaj versaĵoj por komencantoj

Tigro	Trajno	Vento
Sovaĝa bestego	Monstrega serpento	Ni ĝin ie ne vidas
similas al kato	tutkorpe malmolas	sed bone ĝin sentas
Montskuas ĝia bleko	En kavoj de l’ventro	Ĝi fajron incitas
mortigas ĝia bato	Eĉ homoj parolas	kaj fumon forsendas

Tondilo	Transistoro	Zebro
Portranĉa instrumento	Malgranda besto	Ĉevalo kun longaj oreloj
el par’ da elemento	kun stranga intestoj	kaj strioj sur sia felo
similaj, ne identaj	parolas, kantas	La stranga besto estas
Ĉiam interdependaj	en poŝ’ de vesto	Zooĝardena stelo

C’erpita el Ĉina Esperanto - Eldonejo, jaro 1995

El monda beletro

“Hamleto” de Ŝekspiro

Kvina Akto, Unua Sceno, Tombejo. Eniras du tombistoj kun fosiloj.

- Ĉu ŝi ricevos kristanan enterigon, ĉar ŝi ja intence foriris en la mondon de la feliĉuloj?

- Mi diras al vi, ŝi ricevos, faru do rapide ŝian tombon. La juĝisto pripensis la okazon kaj decidis, ke oni devas enterigi ŝin kristane.
- Kiel do ĝi povas esti, kiam ŝi dronigis sin ne pro defendo?
- Nu, oni trovis, ke tiel estu.
- Sed ili simple ne konas la leĝon. Ĉar konsideru: se mi konscie min dronigas, tio ĉi estas ago, kaj ago havas tri partojn: ĝi konsistas el agado, farado kaj plenumado. Sekve ŝi intence sin dronigis.

- He, aŭskultu do, kolego - fosisto..

- Sed permesu! Jen estas la akvo - bone; jen estas la homo - bone. Se la homo iras al tiu ĉi akvo kaj sin mem dronigas, tiam estas certe - ĉu li volas aŭ ne - ke li iras. Rimarku bone! Sed se la akvo iras al li kaj dronigas lin, tiam li ne dronigas sin mem. Sekve kiu ne estas kulpa en sia propra morto, tiu ne ĉesigas sian propran vivon.

Bone, ĉu vi komprenis la enhavon. Kontrolu ĝian tradukon laŭ vi kaj laŭ la jam ekzistanta teksto en la albana lingvo.

Ne forgesu: En Esperanto jam ekzistas tradukaĵoj de pluraj klasikaĵoj!



Ekskursio esperantistesh ne Vlore

Mĉsimi i shtatĉmbĉdhjetĉ- La Deksepa Leciono

Bonvenon al vi ĉiuj al la deksepa leciono! **Ni rememoru hodiaŭ pri adverboj.**

<i>Vi lernas bone</i>	<i>Mi baldaŭ venos</i>	<i>Ni estas tre laboremaj</i>
<i>Li venis sufiĉe frue</i>	<i>Estas agrable labori</i>	<i>Vere estas, ke tiu arbo ĝenas nin</i>
<i>Elirante, ŝi kantis</i>	<i>Ni iras per la piedoj</i>	<i>Mi eklaboras en la mateno</i>
<i>Mi salutas vin el la tuta koro</i>	<i>Ĉiun tagon dum aprilo pluvis kaj pluvis</i>	<i>Vizaĝ altere la Luno cirkulas la teron</i>
<i>Tie ĉi vi trovos amikojn</i>	<i>Mia patro ankoraŭ vivas</i>	<i>Tiun junan homon ŝi preskaŭ ne konis</i>
<i>Ŝi apenaŭ kelkajn fojojn lin vidis</i>	<i>Adiaŭ por ĉiam!</i>	<i>Ĉi tie li deziras resti</i>
<i>Ĉi - matene okazis mirindaj 'oj</i>	<i>Tago festas, for aferoj</i>	<i>For la manojn de Kosovo!</i>
<i>For la revoj pri Granda Serbio!</i>	<i>Ilia voko sonis de supre</i>	<i>Profunde malsupre kuŝis la tero</i>
<i>Jam estas tempo iri domen</i>	<i>La verko estas jam preta</i>	<i>Ĵus batis la sesa horo</i>
<i>Mi ĵus parolis kun la mastrino</i>	<i>Io granda nun naskiĝas</i>	<i>Li ofte eraras</i>
<i>Mi malofte trinkas vinon</i>	<i>S'i volis diri ion plu, sed ŝi ne povis</i>	<i>Li iris kelkajn paŝojn plu</i>
<i>Li tuj kredas la plej nekredeblajn aferojn</i>	<i>Por vi mi farus ion ajn</i>	<i>Mi mensogis, kion ajn mi diris</i>
<i>Ĉu mi iru? Kial do vi ne laboras?</i>	<i>Ha, ĉesu do fari ŝercojn!</i>	<i>Sia buŝo eĉ momenton ne fermiĝis</i>
<i>Nu, vi ja estas virinoj!</i>	<i>Kaj mi ja mem venis al tiuj ideoj</i>	<i>Jen mi estas!</i>
<i>Jen pano</i>	<i>Ĉu vi venas?</i>	<i>Jes, la prezidanto mem preparas projekton</i>
<i>Ne venos rato mem al kato</i>	<i>Vi estimas vin mem, sed aliaj vin ne</i>	<i>Ĉu vi venas? Ne</i>
<i>Vi nepre devas tion sciiĝi</i>	<i>Jen nepre pagenda fakturo</i>	<i>Ju pli oni babilas, sed pli malbone</i>
<i>Ni havas nur unu buŝon</i>	<i>La du tagon nur vespere</i>	<i>Esperanto estas nur lingvo</i>
<i>Se nur vi estus mia amiko!</i>	<i>Ni povas fari nenion pli</i>	<i>Sur la tablo troviĝas plej bongustaj ĉerizoj</i>
<i>Lakto estas pli nutra, ol vino</i>	<i>Du homoj povas pli multe fari, ol unu</i>	<i>La tro multa parolado lacigas lin</i>

Tasko: Traduku c'i suprajn propoziciojn kaj montru la adverbojn en ili.

Nova teksto

Letero

Munkeno, la 23 - an de aŭgusto 1995
Karaj gepatroj,

Jam de kvar tagoj mi estas en Bavario kaj tute ne enuas. Mi mensogus kaj trompus vin se mi asertus, ke la kunveno ne estas agrabla. Male, mi trovis ĝin tre interesa. La interkonatiĝa vespero estis fakte vera spektaklo. Ĉio, kio estis montrita, estis prezentita de la partoprenantoj mem, ĉio estis ege vidinda. Mi iomete hontas ke mi, ne sciinte pri tiu tradicio, nenion kapablis proponi. Eble, vi nun pensas ke ni nur amuziĝas. Tute ne! Multo estas farenda en tiel granda domo kaj ĉiuj kunlaboras por konservi la domon pura. Iu helpas en la kuirejo, aliaj purigas la ĉambrojn. Sed mi rakontos al vi ĉion post mia reveno. Fartu bone! Marko.

Demandoj:

Kial Marko skribas al la gepatroj? Kio estas interkonatiĝa vespero? Ĉu li partoprenis iam ĝin? Ĉu Marko kontribuis al la programo?

Tasko: Traduku:

<i>Gladilo</i>	<i>Gladenda</i>	<i>Kudrilo</i>	<i>Kudrenda</i>	<i>Trikilo</i>	<i>Rompiĝi</i>
<i>Tablotuko</i>	<i>Nasztuko</i>	<i>Kovrilo</i>	<i>Vilaĝano</i>	<i>Partizano</i>	<i>Ŝtopilo</i>
<i>Ekverŝi</i>	<i>Trikaĵo</i>	<i>Vestaĉo</i>	<i>Elegantulino</i>	<i>Tirkesto</i>	<i>Pendigi</i>
<i>Ĉenero</i>					

Pronomo kiel konjunkcio

<i>La junulo, kiu skribas leteron estas Marko</i>	<i>La letero, kiun li skribas, ne estas longa</i>
<i>Ĉio, kio estis montrita estis interesa</i>	<i>Ĉiam estas io, kion mi ne amas</i>

Uzo de adjektivo

Modelo A :

<i>Diru al mi, ĉu tiu fromaĝo estas freŝa</i>	<i>Mi trovas ĝin freŝa</i>
---	----------------------------

Modelo B:

<i>Multo estis montrita</i>	<i>Ĉu vi memoras pri tio, kio estis montrita?</i>
-----------------------------	---

El Historio de Esperanto - Movado

Pri la fakaj organizaĵoj

Trans la limojn Esperanto ebligas la rilatojn inter samcelanoj kaj samfakanoj, apartigitaj de lingva diverseco. Tial en la Universalaj Kongresoj serĉis renkonton la homoj, kiuj deziris preparoli komunajn interesojn kaj reciprokan subtenon. Ekster la oficialaj kongreskunvenoj do naskiĝis la tiel nomataj fakkunsidoj, el kiuj multaj estas regule anoncataj en la kongresaj programoj. Oni serĉis rimedojn por komuna propagando en specialaj rondoj kaj volis liveri pruvojn de apliko de Esperanto en ĉiaj fakoj de la homa vivo. Kelkaj el la plej gravaj internaciaj fakaj organizaĵoj estas la jenaj:

Sennacieca Asocio Tutmonda **S.A.T**
Internacia ligo de esperantistaj Instruistoj **ILEI**
Internaciaj Asocioj de Poŝtistoj, Kuracistoj, Kristanoj, Katolikoj ktp.
Ĉerpita el “**Historio de E - Movado**” de Isbrucker

El Monda Poezio

Nederlando

Jacques Perk

Saliko kaj Poplo

*Amara devas esti gal' kaj dolĉa la miel'
Kolombo tolerema, aglo forta
Aŭskultu hom' al voĉ' de kor' por veni en ĉiel'*

Joost van den Vondel

Birdkantado

*Al best' valoras libereco
sen zorgoj pro deziro
sed avarulo ŝparas spezon
ho, sklavo, povra viro!*

Tasko: Traduku ĉi supre menciitaj fragmentoj el poeziaĵoj.



Esperantisti veteran Doc. Vasil Pistoli merr ne provim studentet

Mĉsimi i tetĉmbĉdhjetĉ - La Dekoka Leciono

Saluton! Hodiaŭ ni mencias ankaŭ la afiksojn - ne tiel kutimaj por ni sed kiuj uzatas en Esperanto. Ni ĉerpis ilin el “**ABC - Gramatiko de Esperanto**”, eldono de Internacia Esperanto Instituto en Hago.

Bon	<i>Bonŝanca</i>	<i>Bongusto</i>	
Ĉ e	<i>Ĉeesti</i>	<i>Ĉemane</i>	<i>Ĉetabla</i>
Ĉef	<i>Ĉefurbo</i>		
Ĉi	<i>Ĉi - kune</i>	<i>Ĉi - foje</i>	
Ĉirkau’	<i>Ĉirkaŭpremi</i>	<i>Ĉirkaŭaĵo</i>	
Ĉj	<i>Viktoro - Viĉjo</i>	<i>Onklo - oĉjo</i>	
De	<i>Demeti</i>	<i>Deveni</i>	
Dis	<i>disdoni</i>	<i>Disvastigi</i>	
Du	<i>dulingva</i>	<i>Dusenca</i>	
Duon	<i>duonplena</i>	<i>Duonvoĉe</i>	
Ek	<i>Ekbruli</i>		
Eks	<i>Eksedzino</i>		
Ekster	<i>Eksterlanda</i>		
El	<i>Ellerni</i>	<i>Elspezi</i>	
Fi	<i>Fidrinkejo</i>		
Fin	<i>Finlegi</i>		
For	<i>Forveturi</i>	<i>Foresti</i>	
Fremd	<i>Fremdlando</i>	<i>Fremdvorto</i>	
Fuŝ	<i>Fuŝlegi</i>	<i>Fuŝi</i>	
Grand	<i>Grandurbo</i>		
Ĝis	<i>Ĝisdatigi</i>		
Help	<i>Helplingvo</i>		
Inter	<i>Interlinio</i>		
Jun	<i>Junedzo</i>	<i>Junaĝo</i>	
Kelk	<i>kelkdek</i>		
Kontraŭ	<i>Kontraŭhare</i>	<i>Kontraŭvizaĝe</i>	
Krom	<i>Kromseĝo</i>	<i>Krompago</i>	
Krud	<i>Krudmaterialo</i>	<i>Krudfero</i>	
Kun	<i>Kunporti</i>	<i>Kunokazi</i>	<i>kunvoki</i>
Kvazaŭ	<i>Kvazaŭvira</i>		
Laŭ	<i>Laŭebla</i>	<i>Laŭvole</i>	
Mez	<i>Mezameriko</i>	<i>Mezepoko</i>	

Mis	<i>Miskompreno</i>	<i>Mistrafi</i>		
Mult	<i>Multekosta</i>	<i>multalingvulo</i>	<i>multsenca</i>	
Ne	<i>Neebla</i>	<i>Nesimetria</i>		
Nord	<i>Nordeŭropo</i>			
Nov	<i>Novzelando</i>	<i>Novedzo</i>	<i>novjaro</i>	
Okcident	<i>Okcident - Afriko</i>			
Orient	<i>Orient - Eŭropo</i>			
Per	<i>Perlabori</i>			
Plat	<i>Platpano</i>			
Plej	<i>Plejamato</i>			
Plen	<i>Plenmano</i>	<i>Plenluno</i>		
Pli	<i>Plibeligi</i>			
Plur	<i>Plurfoje</i>	<i>Plurforma</i>		
Po	<i>Podetale</i>	<i>Pogrande</i>		
Por	<i>Porvivaĵo</i>			
Post	<i>Postiri</i>			
Pra	<i>Pranepo</i>	<i>Prapatro</i>	<i>Prafilo</i>	<i>Praarbaro Prahomo</i>
Preter	<i>Preterlasi</i>	<i>Pretervidi</i>		
Pri	<i>Priparoli</i>	<i>Prikonstrui</i>	<i>prirabi</i>	
Pro	<i>Propeti</i>	<i>proparolanto</i>		
Pseŭdo	<i>Pseŭdoscienco</i>			
Rapid	<i>Rapidtrajno</i>	<i>Rapidperdo</i>		
Retro	<i>Retropaŝi</i>	<i>retrorigardi</i>	<i>retroiri</i>	
Sam	<i>Samlandano</i>			
Sen	<i>Senkora</i>	<i>Senarbigi</i>		
Sin	<i>Sinteno</i>	<i>Sindeteno</i>		
Sol	<i>Solinfano</i>	<i>Solfilo</i>		
Sovaĝ	<i>Sovaĝpomujo</i>			
Sub	<i>Subvestoj</i>	<i>Subskribi</i>		
Sud	<i>Suditalujo</i>			
Super	<i>Supersigno</i>	<i>Superhomo</i>	<i>supernutrado</i>	
Sur	<i>Suriri</i>			
Tra	<i>Traveturi</i>	<i>Travintri</i>	<i>trafrostita</i>	
Trans	<i>Transsalti</i>	<i>Transdoni</i>	<i>transformi</i>	
Tut	<i>Tutlana</i>	<i>Tutkore</i>	<i>tutlegi</i>	
Unu	<i>Unulita</i>			
Vic	<i>Vicprezidanto</i>	<i>Vicrado</i>	<i>vicpatrino</i>	<i>Vicfrato</i>

Vir *Virĉevalo* *Virŝafo*

Esk	<i>Vireska</i>	
Istik	<i>Lingvistiko</i>	<i>Stilistiko</i>
Iv	<i>Produktiva</i>	<i>Kreiva</i>
Pov	<i>Vivopova</i>	

Bone, ĉu vi laciĝis iomete pro tiom multe da afiksoj? Ne forgesu en Esperanto estas maltro da tiaĵoj ol en la aliaj naciaj lingvoj!

Tasko: Ĉu vi povas formi propoziciojn kun tiuj afiksoj? Provu!

Traduku:

La plej kosta ne estas la plej bela. La pli kosta ne estas la pli bela. Tio estas plej ŝatata sporto. Plej bone estus forgesi tion.

Ekzerco

Modelo A:

Ĉu vi memoras la perditajn gejunuloj? Fakte oni nur kredis ilin perditaj.

Modelo B:

Jen du pomoj; granda kaj malgranda. Kiun vi elektas? Mi elektas la pli grandan.

Tasko

Apliku du modelojn sur jenaj propozicioj:

Ĉu vi memoras la mankintan dorsosakon?

Ĉu vi memoras la vunditan knabinon? _____

Jen du aŭtoj; rapida kaj malrapida. Kiun vi elektas?

Jen du vojoj; rekta kaj malrekta. Kiun vi elektas?

Nova teksto

Ĉu oni konsideru ilin perditaj?

Ankoraŭ noktis, kiam ili estis forlasintaj la gastejon. Nun, post trihora grimpado, sur ofte krutaj vojetoj, la longa vico de marŝantoj iomete paŭzas; la dorsosakoj, sur kiuj estas fiksitaj skioj kaj skibastonoj, kuŝas dise apud la ripozantaj grimpemuloj. Peter, la gvidisto, montras la glaĉeron sur kiu ili baldaŭ skios. Ĝi estas atingebla per du vojetoj; per la kruta, ni bezonas nur unu horon, la dua estas malpli danĝera sed ni bezonas almenaŭ unu horon kaj duonon. Vi elektu! Ĉiuj elektis la unuan. La lastvintra neĝo igas la vojeton glita, kaj multaj ofte retroglitas kaj falas. Sed ĉiam helpema junulo montras sin preta helpi falintan junulinon. Tiel, ŝercante kaj ridante, ili atingas baldaŭ la glaĉeron. Finfine ili hejmeniras. Kiam la unuaj atingas la gastejon, la lastaj estas ankoraŭ unu horo for de ĝi. Ĉu revenis ĉiuj? Mankas John kaj japanino Noriko. Ĉiuj estas maltrankvilaj. Ĉu oni konsideru ilin perditaj?

Demandoj:

Kial la skiantoj elektis la pli danĝeran vojeton? Ĉu ili atingebli la glaĉeron? Ĉu ĉiuj revenis gastejon? Kial ?

El Historio de Esperanto - Movado en Albanio

La Aŭtoro de la Esperanto - Ŝlosilo por Albanoj

Ĉefo Fico, filo de juristo Rauf Fico naskiĝis en Gjirokaster je la jaro 1907. Post la morto de lia patrino, sia patro sendis lin eksterlanden, en Leĉe de Italujo por studado. Tiutempe la Itala Esperantistaro organizis konkurson pri internacia lingvo. Fico gajnis la konkurson. La premio estis la rajto por unu rondirado ĉirkaŭ la lando. Tio estis granda sukceso kaj ege stimulis junan Ficon por pluposedo Esperanton, same por disvastigi ĝin. Li finstudis pri konstru - inĝenierado en Torino kaj postmilita laboris en sia patrio, Albanio, en diversaj konstruejoj kaj en Ministrejo pri Konstruado. Lia ŝlosilo por albanoj estis vere praktika, simpla, rapida metodo akompanata de vortareto. Per ĝi ja lernis plurdekoj da albanoj.

Ĉerpita el “Albana Esperantisto”, 1992

Amuza matematiko

- La du montriloj de horloĝo kovras unu la alian, kiam estas la 12 - a horo. La sama stato okazas sur aliaj lokoj de la cifera rondo. Kiom ofte kaj kiam?

Unua ekvacio: $4+5 = 9$ - Certe senerara, ĉu ne?

Dua ekvacio: $4.4 + 4.5 - 5.9 = 4.4 + 4.5 - 5.9$ – Ankaŭ senerara.

Sumo de ambaŭ $5.4 + 5.5 - 5.9 = 4.4 + 4.5 - 4.9$

iom transformita $5 (4+5 - 9) = 4 (4 + 5 - 9)$

dividita per $(4 + 5 - 9) 5 = 4$

estas evidente, ke tiu ĉi kalkulo ie enhavas malkorektaĵon. Sed kie ĝi estas?



Ne shoqerine e nje esperantisti vendas, Torun, Poloni

Mĉsimi i nĉntĉmbĉdhjetĉ - La Deknaŭa Leciono

Saluton! Ni daŭrigu per gramatikaĵoj. Unue, ni ripetu kelkajn **konjunkciojn**. Nome:

Kies

*La amiko, kies patro laboras en fabriko, nomiĝas Marko.
La rivero, sur kies bordoj ni promenas, estas larĝa.*

Ties

*Tiu arbo estas granda.
Ni dormas sub ties branĉoj.
Esperanto estas ĉies kaj nenies propraĵo.*

Uzo de “Nur” kaj “Ne” depende de pozicio en propozicio.

*Nur la gvidisto riproĉis lin. La gvidisto riproĉis nur lin.
Marko ne deĵoras ĉi vespere. Ne Marko deĵoras ĉi vespere.
Ne ĉi vespere Marko deĵoras.*

Ĉu vi povas diri kia estas la diferenco je senco?

“Kia”, “Kio” kaj “Kiu” kiel rilataj pronomoj

*Mi kredis lin malsaĝulo, kia li ne estis envere.
Mi kredis lin studento, kio li ne estas.
Mi kredis lin profesoro, kiu li ne estas.*

Do, kia signas la karakterizon; kio - la statuton; kiu - la personecon.

Rilata adverbo

*Li venis la momenton, kiam mi ĵus eliris.
Diru min la manieron, kiel fari tion.
Ni ĉiuj konas la kaŭzon, kial tio ne plu funkcias.
Prenu mielon en tia kvanto, kiom vi bezonas.
Ni parolos laŭ tio, kiom permesas la deco.
Kiom da homoj, tiom da gustoj.
Tiu kiu ne laboras, ne manĝas. (ĉu vere? Ĉe ni oni diras ŝerce “kiu laboras,
tiu manĝas, kaj kiu ne laboras, tiu manĝas kaj drinkas. ha..ha.).*

Nova teksto

Kies manĝaĵo plej bongustos?

